

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Montreala UK vizitita de 2 anoj



fotita de s-ro Suzuki Keiichiro

La 105-a Univesala Kongreso okazis en Montrealo, Kanado de la 8a ĝis la 13a de aŭgusto. Ĝin ĉeestis 2 el niaj membroj, s-roj Suzuki Keiichiro kaj Namba Fumiharu – fakte estis nur 3 ĉeestintoj el Japanio, kaj 2 el nia rondo, kaj la alia estis s-ro Kai Koichi.

En la Inaŭguro, Namba kaj s-ino Oh Soon-mo el Koreio salutis la kongresanojn nome de la aziaj partoprenantoj (foto 1).

Suzuki prelegis pri vitro, pri kiu li profesie okupiĝis, kadre de Internacia Kongresa Universitato, sub la titolo: “Vitro, mirinda materialo ĉe la Internacia Jaro de Vitro 2022 de UN” (foto 2).

Suzuki kaj Namba komune ĉeestis en la Movada Foiro: ili prezentis pri la japana

movado, nome pri JEI kaj la baldaŭ okazonta 109a Japana Esperanto-Kongreso, kaj pri nia Muzeo! Ni pretigis negrandajn foliojn pri la Muzeo kaj disdonis ilin. La foto montras la scenon de la Movada Folio (foto 3), kaj en la venonta paĝo, ni represas la enhavon de la folio, kiu fakte estis A5-formata folio.



fotita de s-ro So Jinsu



fotita de s-ro Kai Koichi

★ La retadreso de nia redaktejo ŝanĝiĝis. Vidu sube.

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko

■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
 Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)

■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)



Esperanto-Muzeo Jokohama



MALFERMO La 23an de aprilo 2021 la muzeo estis malfermita en Jokohamo, Japanio, okaze de la 6-a datreveno de la fondiĝo de Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama kun la celo montri nunan staton de Esperanto-agado kaj la lingvo mem per afiŝoj, gazetoj, libroj kaj objektoj rilataj al Esperanto ĉefe al ĝeneralaj urbanaj neesperantistaj, kiuj povas vidi, aŭdi aŭ tuŝi per propraj okuloj, oreloj kaj manoj.



ORGANIZANTO La organiza Esperanto-societo, Jokohama Esperanto-Rondo, oficiale Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama, kiu fondiĝis en 1967, kaj estis agnoskita en 2015 de Urbo Jokohamo kies organo de Esperanta versio estas sendita al pli ol 130 esperantistoj aŭ asocioj.



SKALO 2-etaĝa domo kun 106.80m² sur 103.4m² da tereno kun 58m² da spaco por ekspozicii; Ĉambroj Ludoviko Zamenhof kun 13m², Klara Zamenhof kun 16m², Edmond Privat kun 16m², Hector Hodler kun 13m².



EKSPOZICIAĴOJ Oni trovas en la unua etaĝo, afiŝojn pri UK-oj, lingvaĵojn, ekspoziciojn pri la verkisto MIYAZAWA Kenzi kaj Esperanto, Ludon Amrilato, nove

ricevitajn organojn kaj librojn, vendatajn librojn. Oni nun povas rigardi specialan ekspozicion de libroj rilataj al atombomboj sur Hiroŝimo kaj Nagasako. Ĝi daŭros ĝis la fino de la 109-a Japana Esperanto-Kongreso en septembro.



BIBLIOTEKO Okaze de la malfermo de la muzeo oni bonvolis donaci al ni multe da libroj, novaj kaj malnovaj, valoraj kaj raraj. Estas registritaj 10,608 gazetoj, 4,479 librojn kaj 2,028 aliaj memoraĵaj objektoj. Ili ĉefe prezentigas en Ĉambroj Privat kaj Hodler.



Muzeo servas kiel studloko kaj diversaj kunsidoj
Lernoklasoj, Ĝenerala kunsido de la asocio, Zamenhof-festo ktp.

Ĉiutage de la 13-a ĝis la 17-a vi povas ĝui Muzeon.

Adreso Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)

* De la plej proksima stacio Idogaya (Idogaja) necesas 7 minutoj per piede. La stacio situas de la linio Keihin-Kyūkōstacio necesas 7 minutoj de Yokohama (Jokohama).

kontakto: info@esperanto.yokohama
<https://esperanto-muzeo-jokohama.jimdofree.com/>

Vian mon- kaj libro-donacon elkore ni atendas.

Vizito al Esperanto-Muzeo el Svedio

Johannes Ĝenbergĝ

Mi estas Johannes Ĝenbergĝ, kaj mi vizitis la Esperanto-Muzeon Jokohaman je tri fojoj en junio kaj julio ĉi-jare: en unu sabato kaj du merkredoj. Tiam mi partoprenis la kursojn por komencantoj, kiujn mi trovis tre ĝojigaj.

Do, kiu estas mi? Mi estas 43-jaraĝa svedo, kiu loĝas kaj laboras en Stokholmo, Svedio. Mi estas edzo de japanino kaj havas du junajn filojn. Mia historio pri Esperanto estas kaj longa kaj mallonga, kaj do mi parolu pri tio ekde la komenco.

Post jaroj nesciante kion mi studu, mi decidis studi la japanan, pri kio mi tiam havis iom da intereso. Mi enskribiĝis al lernejo por plenkreskuloj kaj ankaŭ al vespera kurso. Per tiu kurso, mi studis la japanan kiel mian trian lingvon, ĉar la tria lingvo estis bezonata por studi la japanan en universitato. Fine, mi estis akceptita al Stokholma Universitato je ties japanlingva kurso, en la jaro 2001. En 2004, mi povis iri al Japanio por studi la japanan dum jaro en la universitato de Waseda. En iu tago, (mi ne memoras ekzakte kiam), kiam mi iris hejmen, okazis pulbazaro de libroj en la korto. Tie, mi trovis la libron "Teach yourself Esperanto", de J. Cresswell kaj J. Hartley. Ĉar ĝi estis malmultekosta, kaj mi aŭdis iomete pri la lingvo dum mia infaneco, mi decidis aĉeti la libron. Mi legis ĝin dum la longa vojaĝo hejmen (mi loĝis tiam en Sōka, Saitamo) kaj antaŭ ol mi atingis mian apartamenton mi jam ekamis la lingvon. Mi decidis lerni la lingvon, kaj mi studis ĝin ĉiutage dum semajnoj.

Tamen, pro la okupateco de universitataj aferoj, mi ekkomprenis ke mi ne havas tempon lerni du lingvojn samtempe. Mi paŭzis la studon de Esperanto kaj daŭre min koncentris pri la japana.

Je la fino de 2006, mi estis malaprobata de mia (aĉa) eseo, kaj mi devis trovi laboron. Ĝuste tiam oni serĉis novajn metrokondukistojn, kaj ĉar miaj du plej bonaj amikoj estis metrokondukistoj, mi decidis ke ankaŭ mi provu. Mi respondis al la anonco kaj estis tuj aprobata por intervjuo. Post ĝi, mi estis dungita kaj ekde februaro 2007 mi estas metrokondukisto.



Mi renkontiĝis kun mia nuna edzino en 2009, kaj ŝi transloĝiĝis al Svedio kaj en 2013 ni geedziĝis. Post 2 jaroj, Leo naskiĝis, kaj Kaj je 2018.

En 2016, mia vivo ŝanĝiĝis pro la filo. Mi ne plu povis iri ien ajn kaj kiam ajn mi volis. Do mi devis trovi novan ŝatokupon, kiun mi povis fari hejme. Mi decidis ke mi finfine lernu Esperanton, post pli ol dek jaroj de la komenco kaj tuja ĉeso. Ne nur ĉar mi bezonis novan ŝatokupon, sed ankaŭ ĉar mi rezignis mian esperon fariĝi flua parolanto de la japana (la japana estas tro malfacila por mi), kaj mi vere volis fariĝi flua en unu lingvo.

Mi plejparte studis Esperanton sola, per retaj iloj kaj fojfojaj Esperantaj renkontiĝoj. Progreso

estis malrapida, pro laboro kaj familia vivo, sed iom post iom mia Esperanto pliboniĝis. Je 2018 mi decidis ke mi volas fari ion per Esperanto, kaj mi demandis min:

"Kial ne ekzistas socia retejo por esperantistoj?"

Mi estas ekde mia infaneco multa uzanto de la interreto, kaj mi komencis uzi sociajn retejojn en la mezo de la unua jardeko de la 21a jarcento. Mia ĉefa socia retejo estis Facebook, sed en 2018 mi opiniis (kaj ankoraŭ opinias) la retejon tro kaosa kaj ke ĝi havas tro da reklamoj. Pro tio ke mi ne estas programisto, mi serĉis programon por krei socian retejon, trovis ĝin kaj tradukis ĉion al Esperanto, per mia lima kapablo de la lingvo. Je 26-a de decembro 2018, la retejo Nubo estis malfermita. Tamen, estis preskaŭ tuj evidente ke mia elektita programo estis erara. Ĝi estis malrapida, malfleksebla kaj havis problemojn de sekureco. Iom post iom la intereso pri la retejo malaltiĝis, kaj post multaj provoj plibonigi la situacion, mi decidis ke mi devas forlasi la projekton.

Sed mi tute ne volis forlasi la ideon de Esperanta socia retejo. Mi fine decidis reprovii, kaj do mi serĉis alternativan programon kaj trovis ĝin. Denove mi tradukis ĉion al Esperanto kaj en 27-a de oktobro 2020, Mia Vivo estis malfermita*. Kaj tiu retejo estas malfermita kaj aktiva eĉ hodiaŭ, kaj ĝi estas mia ĉefa projekto,

kiun mi zorgas preskaŭ ĉiutage. Mi ankaŭ komencis jutubi sub mia propra nomo, kaj foje skribas artikolojn por diversaj Esperantaj retejoj. Tio, kio komenciĝis kiel nur ŝatokupo, estas nun granda parto de mia vivo, kaj mia identeco.

Antaŭ la pandemio mia familio ofte vizitis mian bofamilion en Japanio, sed ĉi-jare estis la unua fojo kiam ni povis iri tien post tri jaroj. Tamen, ĉar ni elektis iri dum la somero, ne estis multe da Esperantaj renkontiĝoj aŭ similaj en Japanio, kaj do mi ĝojas ke almenaŭ la Esperanto-Muzeo de Jokohamo havis regulan aktivadon tiam. Estas mirinde ke oni eĉ povas malfermi tian institucion en la nuna epoko, kaj la zorgantoj, la ges-roj Doi, estas tre agrablaj mastroj.

Ĉar mi partoprenis en kursoj por komencantoj, ni plejparte legis artikolojn kaj ĉapitrojn el libro kaj tradukis ĝin al la japana, inkluzive de mi. Mi kredas ke por la komencantoj, la plej granda problemo estis kompreni la tekstojn. Por mi grave estis traduki ĝuste al la japana. Iom paradokse, mi

devis streĉi mian japanan kapablon por partopreni en Esperanta afero.

Ne ĉio estis ja serioza afero. Ni kafumis, manĝis dolĉaĵojn, trinkis japanan teon, parolis pri Japanio kaj Svedio kaj ridis pri la etaj stultaĵoj en la vivo.

Mi dankas pro la bonvena etoso kaj esperas ke ni povos reenkontiĝi baldaŭ.



*<https://www.miavivo.net/profilo/johannes-genberg/>

el Ĉeĥio

pri eldonaĵoj de KAVA-PECH

Karaj japanaj samideanoj,

unue mi kore dankas al vi por la regula sendado de via interesa periodaĵo Novaĵoj Tamtamas.

Min tre agrable surprizis en la numero 376 la artikolo pri "Hetajro dancas" de Eli Urbanová. Ĉar Eli estis mia bona amikino, mi estas dankema al vi pro tio, precipe al la aŭtoro Mizro Iwaya.

Mi aldonu, ke mi eldonis en mia eldonejo KAVA-PECH ŝiajn tri poemarojn, nome "Prefere ne tro rigardi retro", "Rapidie pasis la temp" kaj "Peza vino". Tiu tria, sed laŭvice la unua, havis tre malgajan sorton: baldaŭ post ĝia eldono la rivero Berounka inundigis mian stokejon kaj do ĝi, same kiel preskaŭ ĉiuj libroj eldonitaj antaŭ la jaro 2002 dronis.

Ĉi-jare estas centjara jubileo de la naskiĝo de Eli Urbanová kaj tiuokaze mi preparas eldonaĵon, kiu omaĝu ŝin. Ĝi konsistos el la dronita poemaro "Peza vino", du mallongaj prozaj tekstoj de ŝi, nome Ĉion kulpas viroj (en kiu ŝi apud aliaj nomas ankaŭ min) kaj Letero al komencantaj poetinoj. Krome ĝi enhavos

biografion de Eli el la plumo de Miroslav Malovec kaj mallongan personan rememoron pri ŝi de mi (verŝajne enkonduke). Kvankam ankoraŭ restas multe da laboro pri ĝi, mi esperas, ke tiu festa libro naskiĝos ankoraŭ ĉi-jare, do en la jaro de la jubileo de Eli.

Gratulon por via valora laboro kaj amikajn salutojn al vi sendas Petro el Ĉeĥio

Petr Chrdle,
KAVA-PECH, +420
736 645 455

P.S.: Jen ankaŭ mia libro "Ĉinio, Koreio, Japanio, landoj similaj sed diferencaj", en kiu mi priskribas ankaŭ multajn miajn travivaĵojn en Japanio, kiu estas mendebla ankaŭ ĉe JEI.

Petro Chrdle

